

# La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 21 – Oktobro – Novembro – Decembro 1992

ISSN 0986 - 1181



Ĉefartikolo

## Post vintro la printempo

Tero blankas pro neĝo. Uragano siblas, ekstere malvarmas kaj frostas, ĉielo nigras kaj turmentigas. Ŝirme kaj sine de varmo la ĝermoj ekvivas, pretigas. Jen unuaj radioj de printempa suno kaj subite ĉio reverdiĝos, naturo serenosa kaj bonon provizos al nia mondo.

Same iras la ĥemaj aferoj kiel la naturaj. Same niaj institucioj kiel la aliaj. Envenis novaj membroj en la Akademion. La diversaj Sekcioj kaj Komisionoj silente planas sed jam fervore laboras.

Kiel unua la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro eldonis raporton pri la fina silabo ik; unu aŭ pluraj aŭtoroj; parto eble senutila kaj do eble forigenda en iuj vortoj, sed tamen nepre radik-parto en aliaj, ĝi eble funkcias kiel sufikso en ankoraŭ aliaj; ĉu eblas pli dedukti el la nuna stato? Ĉu necesas atendi la rezulton de eventuala evoluo? Ĉu eblas konsili la Esperantistojn? Sed kion do ĝuste konsili, se entute konsili?

La Sekcio pri Gramatiko estas antaŭ la problemo de fajna difino de "prepozicio". Ĉu po estas prepozicio aŭ io alia? Ekzemple partikulo speciala por nombroj, kiel -op- estas speciala sufikso. Kiel priskribi la funkciojn de po kaj de kelkaj aliaj vortoj ofte uzataj kun nombroj? Ĉu subjekto aŭ rekta komplemento ĉesas esti tiaj, ĉar oni precizigas ilian signifon per nombro enkondukita de po aŭ de iel similaj vortoj?

La Sekcio pri Fakaj Vortaroj estas silentema. Tamen ege laboranta. Ĝi neniel estas burokrata organismo. Ĝia Direktoro ĉiuflanke disvolvas la "Pekotekon", kiu ebligas al li rilati kun multaj fakuloj kaj iom post iom alveni al ĝenerala interkonsento.

La Komisiono pri "Aprobo de Fakaj Terminaroj" starigita laŭ peto de fakuloj komencis kontroli diversajn verkojn. Sed ĝi montros pli da entuziasmo, kiam la Terminologia Centro de UEA povos komuniki al ĝi verkojn jam kontrolitajn el teknika vidpunkto. La Komisiono kompreneble aprobos el Akademia vidpunkto, t.e. el la vidpunkto de la ĝusteco Fundamenta kaj Oficiala.

Fine la Komisiono "Akademio kaj Landaj Institutoj" donas multajn esperojn. Ĝi planas restarigi dudirektajn rilatojn inter la Akademio kaj la Landaj Esperanto-Institutoj iam iniciatitajn de D-ro Bormann. Nova estos la necesa rilatado kun la ĝeinstruistoj (ILEI). Nova estos la impulso al iom-post-ioma modernigo de ĉiuj ekzamenoj. Pro tio naskiĝis projektoj de du specialaj vortaroj por ekzamen-nivelaj taskoj kaj ankaŭ aliaj projektoj...

Certe la koncernaj Direktoroj volos mem klarigi la nunan staton de siaj laboroj en la paĝoj de La Letero, tuj kiam ili alvenos al necesa stadio de matureco. Se estos deciditoj de la Akademio en rilato kun tiuj laboroj, do tiam aperos novaj n-roj de la Oficialaj Informoj.

D-ro André ALBAUL



# KRONIKO DE LA NUNTEMPO . . .

## Jam kvin jarojn

*Ja de kvin jaroj aperas La Letero de l' Akademio, kiu konsistigas liberan tribunon inter Akademianoj kaj legantoj, kaj krome ebligas al la Akademio rekte publikigi atentigojn kaj rekomendojn.*

*Tion permesis la legantoj, kiuj abonas ĝin kaj ankaŭ la sindonaj gesamideanoj, kiuj aliĝas al la klubo La Amikoj de l' Akademio, kiu klubo donas al la Akademio tri gravajn avantaĝojn: 1-e, juran personecon, 2-e, bankan ĉekkonton, 3-e poŝtan ĉekkonton.*

*Nu ĉe la sojlo de la sesa jaro la Redakcio esprimas dankojn kaj bondezirojn al ĉiuj legantoj kaj amikoj, kiuj tiel subtenadas la laboron kaj ekzistopravon de la Akademio . . .*

\*

Kaj jen kio montros la nemalhaveblan utilon de ilia apogo!

En freŝaperinta *Monatrina Informilo de Sabadell* sur la paĝo dua estas legeble pri "La participoj kaj ilia funkcio" jene: «Unuavice mi ankaŭ insistu, ke la Akademio en sia rezolucio n-ro 8 pri la participoj (vidu Heroldon de Esperanto n-ro 6 (1825) de Aprilo 1990), pragmate rekonas . . . ke "la uzado de la participoj montras la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj", nome tiu tempisma (atisma) . . . kaj la t.n. aspektisma (itisma) teorio . . . » (VELUS).

Nu, la vera teksto de la rezolucio n-ro 8 aperinta en *La Letero* n-ro 7 (kaj legebla en la nun aperintaj *AKTOJ III*, p. 75) estas: «La uzado de participoj montris la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj; sed tiu kun aspektaj valoroj estas la pli malnova, la pli beletra, kaj la Fundamenta. Surbaze de detalaj studoj ankaŭ la Akademio agnoskis la aspektisman signifon de la participoj, kaj neatento al tia decido devas esti konsiderata kiel lingva eraro.

*«Instigo al eraro aŭ propagando por teorioj kontraŭaj al la agnosko de la Akademio povas konduki nur al skismo kaj disdialektiĝo. Redaktoroj kaj recenzistoj, eldonistoj kaj libroservoj havas grandan respondecon pri la unueco de la lingvo.»*

Nu kiam oni citas rezolucion de la Akademio, oni bonvolu almenaŭ ĝin citi en ĝia integreco! Ĉiu ja aprecos je ĝusta valoro la ekspluaton faritan de VELUS des pli, ke rezolucio estas oficiala informo de la Pleno de la Akademio, kompreneble en karaktero tute malsama je tiu de la privataj opinioj prezentitaj de Akademianoj aŭ legantoj.

Ja peko kaj eraro estas ecoj de l'homaro! Ekzemple en lasta n-ro 20 elglitis el la atentemo de la Redakcio misuzo de la vorto *korekta* en jena kunteksto: «Do frazo, kia . . . estas gramatike ne *korekta*.» Kiel rimarkigis leganto, «tiu misuzo pekas kontraŭ la Akademia "BAZA RADIKARO OFICIALA" (Grupo 9, rim. 7; Aktoj II, p. 54) kaj ankaŭ kontraŭ PIV (korekta 2.)). Kaj la vorto devus esti anstataŭigita per *ĝusta*; feliĉe ĉar leganto sciigis la eraron, verŝajne ĉiuj legantoj ĝin korektis mem! Cetere lasi eraron tute ne estas komparebla kun la fakto persisti en eraro kiel VELUS!

\*

Ja la Redakcio komence konsistis el tri personoj, kaj nun restas nur du! Kio evidentigas, ke la *Amikoj* kaj la Akademianoj ne devus atendi lastan minuton por jam antaŭvidi la eblecon kompletigi, se ne pretigi la estontan redakcion.

J.T.

# Demandoj faritaj

dum la publika kunsido de Akademianoj

(UK, Vieno 1992)

D. – «Iuj el la plej oftaj misuzoj de la lingvo rilatas al *komenc(iĝ)i* kaj *fin(iĝ)i* tiel, ke eĉ Akademianoj fojfoje rekomendas rezigni pri la diferenco. Ki-  
on vi opinias?» (B. Moon)

R. – *Ĉu ne dubinde, ke "Akademianoj rekomendas rezigni pri la diferen-  
co"? Eble temas pri iuj instruantoj, kaj tio estas tre bedaŭrinda! La demando  
estas pure instrueca; preferinde estas prezenti verboliston aŭ verbo-noton ne  
simple en la infinitiva formo sed ĉiam kun ĝenerala objekto aŭ subjekto, ek-  
zemple : "komenci ion" – "io staras" – ktp. Tiel la memoro samtempe regi-  
stras la transitivecon aŭ netransitivecon de la verbo. (JT)*

\*

D. – «Ĉu Pekino aŭ Beijing?»

R. – *"Pekino" estas la internacia formo de la vorto almenaŭ ĝis nun;  
"Beijing" la Ĉina ("pinjina" [pinyin]) ortografio. Cetere oni prononcu tiun  
Ĉinan vorton proksimume : b(p)ejĉing. (JT)*

\*

D. – «Ĉu vi povas proponi bonan tradukon (aŭ terminon) por *ghostwriter* (en la Angla), *nègre* (en la Franca), *spookrijder* (en la Nederlanda), *Geistes-  
fahrer* (en la Germana); t.e. ŝoforo veturanta sur aŭtovojo en malĝusta  
direkto?»

R. – *La freŝeldonita "Esperanto-Franca Granda Vortaro" proponas sub-  
verkisto por ghostwriter aŭ nègre, kaj simple ŝoforaĉo por Geistesfahrer. Ja  
"poeti" apartenas al la geuzantoj : ili mem estigu bildojn! (JT)*

\*

D. – «Ĉu ni rajtas uzi la korelativan finaĵon -es jene : Zamenhofes ver-  
koj, mies libro kaj vies krajonoj?» (I. živko).

R. – *La finaĵo -es estas ĝis nun uzata nur ĉe korelativoj kaj la FUNDA-  
MENTO klare asertas en la regulo n-ro 2 : « . . . Kazoj ekzistas nur du : no-  
minativo kaj akuzativo . . . La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de  
prepozicioj (la genitivo per de . . . )»*

(JT)

\*

D. – «Kio pri ĉi tiu fenomeno : 1) mi gardas min, 2) li gardas sin, 3) li  
devas sin gardi, 4) li estas singarda, 5) mi estas singarda, 6) mi devas singlar-  
di, 7) mi singlaras? Ĉu ĉi tiu formo estas estonta refleksivo, ekzemple : mi sin-  
lavas?»

R. – *Sin estas ĝis nun uzata prefikse nur en nekonjugaciaj formoj.*

(JT)

## VOJAĜO TRA LA LANDOJ \*

---

Ĉiu en Esperantio ja scias, kiom da vanaj paroloj kaj skriboj pli-malpli ŝovinismaj ŝprucigis la demando pri la landnomoj. Nun, jen aperis dosiero la plej senpartia, science objektiva, kiu proponiĝas al ĉiu samideano : jen por ĉiu la momento detale ekkonscii pri la problemo en ĝia esenca kerno kaj ĉesi sin lasi blindigi per nuraj afekciaj ekranoj. La landnomoj estas nuraj lingvaj problemoj, kiujn povas solvi nur lingvistikaj konsideroj : historio, etimologio kaj internacieco.

\*

La libro malfermiĝas per *Dediĉo al la Leganto kaj Antaŭparolo de Profesoro Waringhien*, kiuj prezentas kaj la problemon kaj la aŭtoron.

La afero estas instruata kiel en proceso, per sinsekva ekzamenado de dokumentoj, intervenantoj aŭ atestantoj.

Unue temas pri *Genezo de l'trisignifa -uj ĉe Zamenhof* kun tre interesa rimarko pri la sufiksoj : «*Ili per si mem ĝenerale estas largâsencaj, ili ne estu – supleme – plursignifaj!*»

Sekvas la *Unuaj paŝoj kaj stumbloj* (ĝis ĉ. 1910) precipe markitaj de la diskutoj inter Zamenhof kaj Beaufront, kaj ilustritaj de la uzatecoj montritaj en diversaj gazetoj, sed ankaŭ normigemitaj en sistemoj proponitaj de Bavay, Karlsten, Fruictier, Cureau, Hodler kaj Privat.

Poste venas ĉapitro pri *Zamenhof kaj la Eŭropaj lingvoj*, ia konfronto de liaj sep sistemoj kun la internacieco de la landformoj.

Sekvas *La studo de Moch kaj la saĝo de Boirac* : kiel la tiama prezidanto de la Akademio submetis al ia provtempo la proponon kaj logikan kaj internaciecan de Moch . . . en periodo de la Ido-krizo.

Tiam ekas ĉapitro pri la postmilitaj efikoj de la Ido-skismo sub la formo de blindaj fantikecoj kontraŭ la sufikso *-io* : la agoj obstinaj de Cart kaj Corret . . .

Intervenias la raporto de Privat kun ties leteroj al Cart . . . Kaj la sufikso *-io* eniras tamen vortarojn . . .

Rezultas "pruve plena" raporto de Grosjean-Maupin . . .

Kio finiĝas per voĉdono de la Akademio kaj Lingva Komitato en 1922. Sed al ĝi respondas deklaro de Privat favora al la internaciaj formoj, kiun deklaron apogas du novaj vortaroj, unu Germana-Esperanta de Christaller, la alia Enciklopedia de Wüster . . .

Sekve al la Akademia landlisto de 1928 iel kvietiĝas la teoria konflikto, sed la uzado restas ĥaosa . . . Dume SAT ekde sia fondiĝo inspiroĝas el la ideoj de Hector Hodler kaj daŭrigas sian sintenan linion laŭ la proverbo : *Hundo bojas, homo vojas*.

Fine post la Dua Mondmilito la demando reaktualiĝas sekve al la laboro

de la Internacia Geografia Asocio fondiĝinta en 1955 kaj prezidata de Tibor Sekelj, kiu produktas *Mondmapo-n* en 1968 kun "850 nomoj el fizika kaj politika geografioj". En 1971 aperas ankaŭ *Poŝatlaso de la Mondo* kaj en 1974 la *Internacia Komerca Ekonomika Vortaro* de E. Munniksma kun postĉapitro "Landoj kaj valutoj". Nu samjare la Pleno de l' Akademio nuligas "la antaŭan malkonsilion de la Lingva Komitato" pri la sufikso *-io*.

\*\*

## MULTLINGVA GLOSARO PRI LANDNOMOJ \*\*

Ĉi tiu 124-paĝa libreto kunigas la formojn de landnomoj en 50 lingvoj pri-enketitaj : ĝi kompletigas la ĉi-supran studon kaj montras la plej internacian formon de ĉiu nomo pristudita.

Post enkondukaj vortoj pri klarigoj kaj uzmodo : la landnomaj skemoj respondaj al etimoj kaj la aŭtentaj nacilingvaj formoj kun laŭokazaj trans-literigoj aŭ -skriboj, ankaŭ pri la lingvo-grupoj kun ties simboloj kaj la listoj de pli ol sesdek kvin kunlaborintoj (el kiuj dudek du Akademianoj), venas 93 landnomaj plenpaĝoj kun nacilingvaj formoj klasitaj laŭ strukturo kaj derivmaniero. Kaj la libro finiĝas per genealogia klasifiko de l'Indo-Eŭropaj lingvoj, skemoklasifiko de l'aliaj lingvoj, kaj alfabetaj listoj de la lingvo-simboloj.

\*\*\*

Nu al kiuj konkludoj nin kondukas tia vojaĝo tra la tempo kaj la lingvoj pri la Esperantaj landnomoj?

Ja, nun evidente estas montrite, ke landnomoj ne povas dependi de kapricoj eĉ grupaj, kaj des pli individuaj, ĉar ili estas propraj nomoj, kiuj rezultas el la historio, el la etimologio kaj el la plej internacie uzata formo, eĉ se ne estus nur pro poŝtaj faciligoj!

Kiu amas la prilingvajn problemojn, tiu nepre ĝuos tralegi, se ne trastudi, tiajn nemalhaveblajn librojn, verajn dokumentojn por formigi al si opinion.

Jean Thierry

---

\*) André Albault. *Vojaĝo tra la landoj, Historia-lingva studo pri la land-nomoj. Saarbrücken : Iltis, 1991. 195 p.*

\*\*) André Albault. *Mult-lingva Glosaro pri Land-nomoj. Saarbrücken : Iltis, 1991. 124 p.*

---

*La Redakcio deziras al siaj legantoj*

# Bonan Jaron 1993

# Reage al . . .

## Reage al la demando

en *La Letero*, n-ro 19

respondas Ionel Onet el Usono : «Pri la ekzisto de la diftongoj *iŭ* aŭ *uŭ*, mi informas vin, ke la unua ekzistas en la Rumana, kaj en la baza leksiko de la lingvo kaj en toponimoj. Ĝi literumiĝas *iu*. Same literumiĝas ankaŭ la diftongo *ju*. Jen por ekzemplo du toponimoj : *Gurghiu* kaj *Giurgiu*. La unua legiĝas *gur-giŭ* kaj la dua *guur-gju*. Toponimo enhavanta la saman diftongon *i* ŭestas ankaŭ *Sibiŭ*. La sama diftongo troviĝas ankaŭ en kelkaj antaŭnomoj : *Vini-ciu*, *Morariu* (tiu ĉi prononcata ankaŭ *ŭmo-ra-rju* kaj *mo-ra-ri-u*). En la ĉiutaga leksiko la sama diftongo aperas sufiĉe ofte. Jen kelkaj ekzemploj : *viu*, *purpuriu*, *stacojiu* [-ko-jiŭ], *cafeniu*, *scatiu*. (Interese, la sama vorto uzata kiel familia nomo legiĝas *ska-ti-u*). Mi listigis ĉi-supre kelkajn ekzemplojn, kiuj venis en mian kapon sen troa pripensado de la afero. Kiel vi povas konstati, la diftongo *i* ŭaperas ĉiam vort-fine, kaj mi vere ne povas trovi vorton, en kiu la koncerna diftongo aperas ene aŭ komence de la vorto. Substrekendas, ke ĝi neniel similas al la Franca *u* aŭ al la Germana *ü* pro la simpla motivo, ke tiu sono tute ne ekzistas en la Rumana.»

respondas Hernâni A. Resende el Portugalio : «La diftongo *iŭ* ekzistas sub la tre oficiala formo *iu* en la Portugala lingvo. Ekzemple : *ela adquiriu* (ŝi akiris); *ele redigiu* (li verkis). Krome en kelkaj elparoloj de suda Portugalio la finaĵo *io* diftongiĝas : *tio* = tiŭ (onklo); *rio* = riŭ (rivero). Rilate la diftongon *uŭ*, oni povas diri, ke ĝi "spontane" formiĝas en kelkaj okazoj. Ekzemple : *eu suo* = eŭ suŭ (mi ŝvitas), *actuo* = atŭŭ (mi agas). Mi kromdiru, ke por Portugal-parolantoj el diversaj landoj la diftongo *iŭ* estas simple elparolebla, kiel diversaj aliaj diftongoj de aliaj lingvoj. Ne ekzistas universala facileco aŭ malfacileco, sed tre malsimilaj sistemoj.

Sendis Hans Wiersch el Germanio (kunordiganto de la Sekcio Terminara de IKEF) studaĵon pri la ellaso de diakritaj signoj en Esperanto.

## Reage al la diskuto

pri norden kaj norde,

Skribas Prof. P. Daŝgupto el Hindio (Hyderabad) : «En via respondo al Pokrovskij vi atentigas pri la ebleco diri en la *sudo de Francio* aŭ en la *nordo de Italio*, kiel Rosbach jam faras en sia gloso klarigante la duan sencnon de la esprimo *norde de*. Mi certe konsentas, ke tiu malpaka dirmaniero estus unu solvo de la embaraso kaj taŭgus en iuj okazoj. Sed mi volus dividi kun vi kaj la legantoj mian senton, ke ni povus — sen perforto al la spirito de la lingvo — uzi ankaŭ la diferencigajn esprimojn *sude en Francio* kaj *sude al Francio* por la du sencnoj de *sude de Francio* en okazo de konfuzo. *Sude al Francio* estus interpretebla simile al *vidalvide al*, *fronte al*. En *sude en Francio* oni rigardus la adjekton en *Francio* kiel klarigon pri la bazo de la sudeckalkulo. Oni kompreneble provu ne tro uzi tiel delikatajn esprimmanierojn en ĉiaj kuntekstoj — nur en okazo de bezono. *Sude de* pli facil-flue tenas sin al la senproblema supraĵo de la lingvo, por tiel diri, dum *sude al* kaj *sude en* pli cerbumigas. Mia gramatika sento ne akceptas la Anglan-Rusan solvon de Pokrovskij, ĉar ĝi kondukas al esprimoj kiel *Kanado estas norden de Usono*. Oni rimarku, ke inter la du frazoj *La vojaĝo estis al la ĉefurbo* kaj *La vojaĝo estis ĉefurben*, dum eĉ la unua estas iom dubsona, la dua sonas nete neakceptebla. Tio indikas, ke la lingvo ne ŝatas direktajn akuzativojn kun stataj verboj.»

komentas Heinz Platzer el Aŭstrio : «AA tute prave atentigas pri la difino de la mov-akuzativo. Aliflanke por mi (kiel nekompetentulo) enkonduko de ia semantika diferenco inter *norde de . . .* kaj *en la nordo de . . .* estas nur harfendaĵo kaj racie ne pravigebla, ĉar ĝi klare kontraŭas la ĝisnunajn lingvokutimojn (komparu PAG § 92 : *en bona stato* = *bonstate*, ktp) . . . Mia opinie apenaŭ ekzistas lingva esprimo sen ia kunteksto kaj en plej oftaj kazoj ĝia kunteksto klarigas tiajn dubajn tekstpartojn!»

sin demandas Antono Meche-lynck el Belgio : «Ĉu ni akceptu, ke tiu esprimo *norde de* permesas la du cititajn signifojn, inter kiuj tamen la kunteksto preskaŭ ĉiam ebligas solvi la ambiguecon? Kaj

por la kazoj, en kiuj verkanto sentas nepran bezonon eksplicite solvi tian ambiguaĵon per lingvaj rimedoj, mi sugestas, ke oni diru je la nordo de aŭ norddirekte el en unu kazo (kp. A. *to the north of, northwards of, northwards from*, F *au nord de, au nord par rapport à*), kaj en la nordo de a ŭen la norda parto de en la alia (kp. A. *in the north of, in the northern part of*, F *dans le nord de, dans la partie nord de*). Kompreneble la stilaj necesoj ne estos konstantaj, kio faras, ke la lasta decido nepre apartenos al la "sana juĝo" de la verkisto . . . se ĝi fakte estas sana, pri kio la opinioj cititaj de J. T. en sia artikolo "En la 105-a Esperanto-jaro" foje permesas dubi!»

## Reage al "Senatendaj demandoj"

rimarkigas Heinz Platzer el Aŭstrio : «AA asertas, ke la ne tre kutima vorto *okso* devenas el la Angla *ox* aŭ el la Germana *Ochs*, en kiuj ĝi signifas nur bovo. Liaj etimologiaj rimarkoj estas tute ĝustaj. Tamen en ambaŭ lingvoj la nuna lingvouzo indikas nur specife kastritan (masklan) bovon. Bonvole komparu : *An ox is a castrated bull that is usually used for pulling vehicles or carrying things* (Collins Cobuild. English Language Dictionary. 1987). Same en la Germana : *Ochse. kastriertes mannliches Rind* (Duden. Das Bedeutungswörterbuch. 1970). La difino en PIV estas ĝusta.

atestas Antono Mechelynck el Belgio : «Tradukante el la Franca la verkon "Citadelo" de Saint-Exupéry, mi renkontis la sekvan frazon (mi citas ĝin el memoro, t.e. kiel eble plej fidele) : "La principale caractéristique de la prière est qu'il n'y est pas répondu". Celante redoni kiel eble plej fidele en Esperanto la intencon de la aŭtoro, mi sendepende "retrovis" la rimedon, al kiu aludas la 4-a demando, kaj tradukis "La ĉefa eco de la preĝo estas, ke al ĝi ne estas respondate". Tio ŝajnis al mi la Esperanta frazturno plej fidela al la Franca frazturno de la originalo; tiu cetere montras, ke la nepersona uzo de la pasivo, kvankam multe pli malofta en la Franca ol en la Germana, tamen ne estas tuttute fremda al ĝi. Mi ja konfesas, ke ĉi tiu kunteksto – verbo, kies aganto supozeble ekzistas, sed la verkanto intence deziras ne eldiri la nomon, kaj ankaŭ ne anstataŭigi ĝin per la mallaŭda pronomo *oni* – estas multe pli malofta ol la kunteksto cititaj el la Germana, kaj kiujn la Franca kaj Esperanto redonas per la uzo de nepersona pronomo kiel *oni* aŭ *tio*.»

## KOMUNIKAS LEGANTOJ . . .

Adán Hryniewicz (Ergoto de Bonaero) asertas, ke li trovis kelkajn "perlojn" en *La Letero n-ro 17* :

– "Simila problemo estas . . . levata . . ." (paĝo 1, linio 15).

– "Francaĵo, li ekkrias, kiam ĝi falis?" li ironias . . . – Nu "levi demandon" skribis D-ro L. L. Zamenhof mem, eĉ "Similan projekton levis s-ro Grabowski" (L. L. Z.). "Eĉ se la demando estas levita antaŭ la kreigo de la lingvo." (L. L. Z.).

– "Enteni" (paĝo 7, linio 5).

– "Esperantalo aŭ pseŭdo-Esperanta vorto", li denove ekkrias!

– Nu "El sama tero venas, saman sukon entenas" respondas D-ro L. L. Zamenhof; eĉ "La interna ideo, entenata en la Esperantismo" konfirmas la uzatecon de L. L. Z.

Gratulon al Ergoto! Tiel ĉasavida je "Francaĵoj", li kvalifikas "Francaj perloj" vortojn de . . . Zamenhof mem!

\*

El Den Haag leganto riproĉas jenajn vortojn en *La Letero n-ro 20* :

– lakone (?) – Tamen Zamenhof ekuzis ĝin : "Verŝajne ĉi tiujn lakonajn demandojn li faris al si mem"!

– sane (?) – Tamen Zamenhof ekuzis ĝin : "La infano falis en sanan dormon".

– memkompreneble (?) – Laŭdire la vorto estas Germanismo! Kial ne? Cetere skribis Zamenhof : «En lingvaj demandoj ĉiu superflua decido katenas». Ĉio klara estas Esperanta! Por priparoli palacon apartenan al reĝo, nenio malhelpas diri kun malsamaj nuancoj memkompreneble :

– la palaco de la reĝo – kiel en la Romaniaj lingvoj;

– la reĝa palaco – kiel en Latino.

– la reĝpalaco – kiel en Germanida lingvo.

Kial malriĉigi lingvon pretekste, ke tiu aŭ tiu ĉi dirmaniero ekzistas jam en alia lingvo?

– kuŝas (?) – Tamen Zamenhof skribis en LA FUNDAMENTO "Sur la tero kuŝas ŝtono"! Kial ne "ŝpicbergo . . . norde de Norvegio"?

– Angla kaj Rusa (?) – Kio ĝenas? Ĉu la majuskloj? Eĉ en siaj lastaj verkoj Zamenhof majuskligis la derivaĵojn de la popolnomoj (PAG, § 39).

– Verfakte (?) – Ja ĉiu fakto estas vera! Sed "verfakte" estas jam Esperantismo, ia formo de insistado, kiun lingvistoj kutimas nomi: "redundanco" (PIV-suplemento).

\*\*

El Den Haag de alia leganto pri jenaj vortoj en La Letero n-ro 20:

– kalkeo (?) – El *NePIVaj Vortoj* de A. Cherpillod – Teknika vorto de lingvistoj, kiu nomas la procedon, laŭ kiu vorto estas transigita de unu lingvo al la alia per kopiado.

– centrifuga (?) – La vorto estas menciita en PIV kiel registrita el la 1-a Oficiala Aldono, kaj same kiel CENTRIPETA ĝi estas ja sciencia vorto, kiun enkondukis kaj kontrolis la sciencaj kunlaborantoj de PIV H. Sirk, F. J. Belinfante, W. J. Nijveld (inĝeniero el Amsterdam) sub la direktado de R. Haferkorn (inĝeniero).

\*\*\*

Oni ne diru, ke tiuj ĉi vortoj estas Francaj vortoj altruditaj de Francoj: tio montrus nur la malbonan efikon de la pamfleto: "La Bona Lingvo"!

(J T)

---

## Kian komputoron aĉeti?

Ofte niaj samideanoj estas en embaraso, kiam ili volas aĉeti komputoron!

Ŝajne la plej elementa konsilo estas, ke oni informiĝu, ĉu eblos per la dezirata maŝino ĝuste skribi Espe-

ranto-tekstojn. Kaj tiu teoria postulo reduktiĝas al jena konkreta demando: Ĉu ekzistas por tiu maŝino fidinda mensvaro por literfarado, kiu estu kongrua kun via ĉefa mensvaro. Ĉi-lasto por la plimultaj el ni ordinare estas mensvaro pri "redaktado" (teknike pri "teksto-traktado"). Se la respondo estas jesa, do vi povas aĉeti!

Efektive, se ekzistas en la komerco kelkaj mensvaroj, kiuj liveras literaron (skribsignaron) kune kun la 12 Esperantaj supersignitaj literoj, tiuj ne brilas per sia nombro. Tiuj literoj aperas strikte nur en Esperanto kaj sekve ili interesas nur malmultajn komercistojn! Sed se eblas mem fari tiujn literojn, do ne plu estas problemo. Plej bone oni estas servita de si mem!

---

**Mensvaro**: registraĵo, kiu povos regivan komputoron por difinita laboro (teksto-traktado, publikigado, kontado ktp.). Ĝi povas konsisti el unu aŭ pluraj disketoj aŭ magnetaj bendoj ktp, sur kiuj estas registrita la rezulto de mensa laboro de unu aŭ pluraj aŭtoroj; nome, el pluraj aŭ el granda kvanto da kunligitaj programoj, proviz-informoj ("datenoj"; i.a. skribsignaroj), ktp. Vi lernos manipuli mensvaron dank'al unu aŭ pluraj libroj, kiu(j) estas ĝia nepra aldono. – Disketo estas havebla por kelkaj frankoj; mensvaro valoras de kelkaj dekoj da frankoj ĝis kelkaj miloj da frankoj. – (A. *software*, F. *logiciel*). Sinonimoj: *softvaro*, *softvo*, *programo*, *programaroj*, *programdisko*.

---

**LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO.** Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – *Redaktoro*: Jean THIERRY. – *Direktoro de la publikaĵo*: André BOURDEAUX. – *Presejo*: COCONNIER, 72300 SABLÉ. – *C.P.P.*: n-ro 6971. – *Prezo*: 1 n-ro: 40 FRE – *Jara abono*: 120 FRE – *Pagebla*: ĉe kontoj: Banka: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – Poŝteka: 735 27 B Paris. – UEA: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag): nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

### Perantoj por diversaj landoj:

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta): S-ro UMEDA Yosimi, I.E.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo: ScS Ed Jockey Club – Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio: S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301.

Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko: S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Svedio: Sveda Esperanta Federacio: c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono: Eldonejo Bero: P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.